

Okdek jaroj de esperanta vivo, 13-a parto
Devjatnin, Borovko kaj Kofmann
Claude Gacond, 191-a radioprelego, 1967.06.07 & 1967.06.10

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Unu el la plej eksterordinaraj kunlaborantoj de Zamenhof en la redaktado de la unua gazeto *La Esperantisto* estis **Vasilij Nikolajeviĉ Devjatnin**.

A.- Eksvolapukisto, tiu profesoro pri la latina kaj rusa literaturoj, iom post iom ĉesis instrui por sin dediĉi entute al la riĉigo de la esperanta literaturo kaj al la disvastigo de la zamenhova lingvo.

Cl.- Estas en 1891, ke li eklernis esperanton. Plian fojon ni konstatas, ke Volapük estis instrumento, kiu faciligis la lernadon de nia lingvo. Jam post unumonata studado Devjatnin sendis al Zamenhof tradukon de poemo de Lermontov : *Anĝelo*.

A.- La versoj de tiu romantika poemo fluas jam agrable kaj anoncas talenton. Aŭdu la unuan strofon :

Cl.- *En mezo de nokto, en blua ĉielo,
Traflugis kaj kantis plej bela anĝelo.
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun' en irado
Atentis kun ĝojo je l' sankta kantado.*

A.- Tri jarojn poste Devjatnin eldonas du librojn: *Demono*, poemo de Lermontov, verko 57-paĝa, kaj *Boris Godunov* de Puŝkin, verko 95-paĝa. En tiuj tradukoj Devjatnin eble uzas kelkajn facilajn rimedojn, kiel la adasismojn kritikatajn de Antoni Grabowski en la poemo *Sur unu kordo*:

Cl.- *Dukorda liro? – Tial zumi
Kaj tinti adasiste mem
Mi devas? Kordoj havas du mi,
Sed fingrojn kvin por kord-ekprem'!*

A.- La esperanta publiko preferos longe la versojn de Devjatnin al tiuj de Grabowski, kiuj estas pli komplikaj, kvankam Devjatnin trouzas la facilan rimedon de la afiksaro por la rimado.

Cl.- Devjatnin estas verkabunda tradukisto. En 1906 li entreprenas la eldonadon de *Plena Verkaro*, kiu nombros en 1911 584 paĝojn. Kaj ĝis 1938 li aldonas novajn valorajn tradukojn al tiu verkaro.

A.- En Esperantujo bedaŭrinde neniu liceo sisteme instruas nian literaturon al gelernantoj. Plie verkoj elĉerpitaj estas rapide forgesataj. Tiu forgesemo estas maljusta rilate al la pioniro Devjatnin. Aŭdu kiel elvokaj estas liaj versoj en la originala poemo *Velga* :

Cl.- *Malafabla estas nordo...
El la spaco malproksima
Fluas al ŝtonoza bordo
La glacia mar' senlima
Dormas la naturo morta...
Neĝ... glacio... kaj neniam
Ĉesas blovi vento forta...
Kvazaŭ regas tie ĉiam
Frosto en la tuta mondo...
Sed subite en silento
Super griza plumba ondo,*

Okdek jaroj de esperanta vivo, 13-a parto

Devjatnin, Borovko kaj Kofmann

Claude Gacond, 191-a radioprelego, 1967.06.07 & 1967.06.10

*Tra malvarma frosta vento,
Ekaŭdiĝas kri' de l' mevo...
Jen ŝi flirtas en aero,
Nekaptebla, kiel revo,
Jen rapidas ŝi al tero,
Jen en maro malaperas...*

A.- Aŭdante aŭ legante tiun poemon oni apenaŭ povas kredi, ke temas pri versoj, tiom la lingvo estas flua kaj facile komprenebla.

Cl.- Kia privilegio estis por esperanto havi tiom lertan verkiston, kiu dediĉis ĉiujn siajn fortojn al la tradukado el la rusa literaturo, kaj al la verkado de originalaĵoj. Kiam la reformemularo inter 1907-1914 por la dua fojo provos miskreditigi la lingvon de Zamenhof, tiam la eldono de la *Plena Verkaro* de Devjatnin estos la plej trafa respondo.

A.- Aliaj nomoj de la unua rusa-germana periodo devas esti konataj. Ni hodiaŭ menciuj **Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko**, rusa ĵurnalisto kaj lerta tradukisto. En 1895 li donis al Esperantujo tradukon el **Puŝkin** : *La Ŝtona Gasto*.

Cl.- Borovko estas unu el la solaj pioniroj, kiuj interesiĝis pri la deveno de esperanto. Estas al li, ke Zamenhof sendis sian intereseĝan leteron pri la naskiĝo de esperanto, tio verŝajne en 1895.

A.- La saman jaron Borovko edziĝis kun **Antonina Justinovna Ĉajkovskaja**, eksterordinara esperantistino, kiu gvidis la unuan vojaĝon per esperanto tra Ruslando kaj multe prelegis pri kaj en esperanto ĉe la plej diversaj rondoj.

Cl.- Geedzoj Borovko-Ĉajkovskaja povas esti konsiderataj kiel la patronoj de la esperantistaj paroj. Esperanto estis por ili vivanta hejma lingvo.

A.- Alia pionira talentulo estas Antoni Kofmann. Tiu rusa librotenisto bedaŭrinde forlasis nian movadon por aliĝi al Ido kaj poste al Occidental. Kiam oni legas liajn tradukojn kaj originalajn verkojn, oni povas nur malbeni la tagon, kiam la demono de la reformemo lin silentigis, tiom maturaj estas liaj unuaj verkoj. Aŭdu kelkajn versojn el la traduko de *La Sklavoŝipo* de Heine :

Cl.- *La ŝipoŝargisto Minheer van Kek
Sidadas en longa medito,
Li taksas sur ŝipo la koston de l' ŝarĝ',
La sumon de ebla profito.*

*Tricent barelegoj da pipro, da gum'
Kaj poste la sablo de oro...
Ĝi estas tre bona, sed tamen al mi
Pli plaĉas la nigra trezoro.*

*Ses centojn da negroj mi ĉe Senegal
Akiris je prezo profita.
Malmola viando, simila al ŝton',
La membroj – el ŝtalo forĝita.*

*Mi donis por tiu ĉi bela akir'
Brandakvon, glasperlojn kaj feron ;
Gajnonte en ĉio ok centojn je cent,
Mi faros bonegan aferon.*

Okdek jaroj de esperanta vivo, 13-a parto

Devjatnin, Borovko kaj Kofmann

Claude Gacond, 191-a radioprelego, 1967.06.07 & 1967.06.10

Se restos el ili ne pli ol tricent

Ĉe veno al Rio-Ĵaneiro,

Mi havos cent orajn dukatojn pro pec'

De l' domo Gonzales Perejro.

A.- Simpleco, granda viglo, senfinaj stilaj malkovroj, jen la riĉeco de tiu talentega pioniro.

Aŭdu originalan poemeton humorplenan, kiu venas substreki nian aserton :

Cl.- **Malpli kaj multipli**

Blanka maneto

de Henrieto

estas malgranda, ho mia Di' !

Sed ŝia koro –

kia doloro –

estas malpli!

La plektoj haraj

neordinaraj

estas longegaj, ho mia Di' !

Sed longo langa -

fakto tre stranga -

estas multipli.

Ŝia talio

kiel lilio

estas mallarĝa, ho mia Di' !

Sed la prudento -

kia turmento -

estas malpli.

Ŝiaj okuloj

kun ardaj bruloj

estas nigregaj, ho mia Di' !

Sed la animo -

Ho kia rimo -

estas multipli.

A.- Kun tiu amuza, sed tamen iom pripensiga poemo de Antoni Kofmann, ni forlasas hodiaŭ nian temon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-